

N°177
janvier
février
mars
2017

LA INFORMILO

N° 177
januaro
februaro
marto
2017

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto
France-Est

ESPERANTO
2017
Justa komunikado

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 17€

Reta abono: 7,50€



KONSTRUADO kajero de TAKE 2017

Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
Wintzenheim Francio

À l'occasion du 69ème Congrès International des Cheminots Espérantophones qui se tiendra à COLMAR (68) du 17 au 23 mai 2017, l'équipe de rédaction de la revue KONSTRUADO de TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj – Association Mondiale des Espérantophones Professionnels du Bâtiment) a eu l'idée de présenter dans un numéro spécial différentes gares ferroviaires à travers le monde: Gdansk, Wrocław, Zagreb, Vienne, Stuttgart, Saint-Etienne, Colmar, plusieurs gares du Chili, Ŝinĉi aŭ Japon, sans oublier la fameuse gare de Perpignan, «au centre du monde», chère à Salvador Dali. Y figure aussi un article sur le nouveau tunnel du Saint-Gothard. L'espéranto comme outil professionnel! Un bel exemple de coopération entre associations spécialisées!

Esperanto France-Est CCP 1997 72 W Nancy		Version		Mia elekto
Si votre adresse est inexacte, veuillez la rectifier	1) Abonnement à La Informilo	Papier	PDF	
	Pour 2017	17 €	7,5 €	
Via kodo:	Pour 2018	17 €	7,5 €	
	Pour 2019	17 €	7,5 €	
	2) Cotisation fédérale	Simple	Soutien	
	Pour 2017	7 €	20 €	
	Pour 2018	7 €	20 €	
	Pour 2019	7 €	20 €	
Adresse courriel pour version PDF:	3) Livres			
	4) TAKE: Konstruado-kajero 2017		8 €	
Somme à payer par virement CCP ou chèque à envoyer à				
André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM			Total	

LUMINESK!

Nova silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio

Fine de 2016 refoje okazis Luminesk, jam la dua, ĉi-foje en Kleve en okcidenta Germanio proksime al la Nederlanda Landlimo. La organizado estis grandparte transprenita de Andreas Diemel, komisiito de GEA-Germana Esperanto Asocio, helpis lin ankaŭ Alfred Schubert, eksa ĉefredaktoro de germana E-aktuell.

Certe ĝi estas pli modesta aranĝo ol la antaŭaj IF-oj, sed la etoso estis simpatia kaj tute amika. Simile kiel ĉe IF, matene eblas elekti inter 2 prelegoj, kaj same posttagmeze antaŭ kaj post la kafo-paŭzo.

Kelkaj partoprenantoj iniciatis plurajn programerojn, kiuj estis tre ŝatataj kaj kontribuis al la plena sukceso de tiu semajno. Krome estas proponitaj 2 tuttagaj ekskursoj kun libera ebleco tagmanĝi en restoracio aŭ en mem-servejo.



Ĝis komenciĝis la 28an de decembro. En la stacidomo de Kleve bone funkciis la transporta servo. La junulargastejo troviĝis iom rande de la urbo sur monteto. Rapide Andreas Diemel prizorgis la akceptadon kaj transdonon de ĉambro-ŝlosiloj. Jam konataj vizaĝoj aperis, ni ja estas ĉe Luminesk.

En la interkona vespero sin prezentis la diversaj prelegantoj kaj en tiu unua vespero ni eksciis pri la feroaj dancoj. Martin Strid el Svedio detale klarigis pri la originoj, la tradicioj, la celoj kaj iniciatis al tiaj rondo-dancoj kun forta deklamado de iuj rakontoj, feliĉaj aŭ tragikaj. Li mem tradukas al Esperanto centojn da tiaj rakontoj.

Li montris filmojn pri tiaj dancoj sur la Feroa insulo.



,&4466.2. La ŝipo Albertina:

'1 Ŝip' konstruiĝis en la Nordo ;

Albertina, tiel estis ĝia nom' ;

Pumpu for! ;

Albertina, estu vere ;

Albertina, sendanĝere ;

Albertina, tiel estis ĝia nom' ;

Pumpu for!

'2 Kaj ta ŝipo ja estas jam rigita ;

(! : jam rigita per jardekoj kaj maristar'

(x : Pumpu for!) (: Jam rigita,)

(x : estu vere ;) (: jam rigita,)

(x : sendanĝere ;)

(: jam rigita per jardekoj kaj maristar' ;)

(x : Pumpu for!)

'3 Kaj ta ŝipo jam estas kolorita ;

kolorita per ruĝo kaj viol'

'4 Kaj ta ŝipo ja estas jam lanĉita ;

jam lanĉita per pompo kaj ĉampan'

'5 Kaj ta ŝipo ja estas jam ŝarĝita ;

jam ŝarĝita per brando kaj bier' ..

'7 Al Madejro nun havos ni direkton,

al Madejro l' direkto estos do

'8 Kaj ploras knabino sur la strando ;

jes, ŝi ploras pro l' amiko sur la mar' .

'9 Kaj la ŝipo jam fine surgrundiĝis ;

surgrundiĝis inter ŝeroj kaj ondromp' ..

'10 Kaj la ŝipo jam estas elrabita ;

elrabita inter ŝeroj kaj ondromp' ..

'11 Kaj la tombo jam estas fosita ;

jam fosita inter ŝeroj kaj rokar' ...

'12 Epitaŭ' ĝia estas jam skribita ;

jam skribita en oro en latin' ...

'13 Tial ploras knabino en la Nordo ;

kaj ŝi ploras pro malesta marist'

Baladaj ĉen-dancoj – fortikaĵo por nia lingvo! *Martin Strid*

Ĉen-dancoj baladaj helpas vivteni kaj fortigi malgrandan lingvon, kiel montras sperto de miljara tradicio en Feroaj Insuloj. Ĉendancon kaj rekantaĵon ĉiuj povos partopreni. Ĝi donos intensivan etoson al kunveno. La kantoj fortigos la lingvon por komencantoj kaj maloft-parolantoj. Kaj novaj heroaj baladoj instruos nin pri historio de Esperanto. Venu aŭdi pri bravuloj, ĉendanci, rekanti kaj enfali en la ritmo-paŝan "trancon" menso-purigan de monotona melodio!



La viglaj ritmoj kun la forta voĉo de la gvidanto Martin Strid instigis plurajn ĉeestantojn eniri la ĉen-dancadon kaj aŭskulti la diversajn baladojn, kiujn li ofte mem tradukis. Aliajn li mem verkis aŭ eĉ uzis jam ekzistantajn Esperanto-tekstojn, kiujn li lerte sukcesis deklami.

Tiel la ĉeestantoj eniris en tiun "Nordian estoson" kaj agrable ĝuis tiun novan manieron uzi Esperanton.

En aliaj vesperoj ankaŭ eblis ĝui lertan akordeonajn melodiojn fare de Kees.



En la tradiciaj IF estis ege gravaj la vesperaj kunsidadoj ĉe bieroj aŭ aliaj trinkaĵoj, la tiel nomata knajpo. Tamen jen ĉi-foje nova maniero vespere kunsidadi ĉe tasoj da teo kaj samtempe aŭskulti, literaturaĵojn, enigmojn, anekdotojn ktp. Inter la gejunuloj ĝi estas konata, kiel la GUFUJO. Tion iniciatis Joŝie kaj Dieter Klemann.

Korine Cheizoo volonte rakontas pri siaj impresoj kaj propra aktivaĵo, okaze de ĉi-tiu 2a Luminesk.



La 2a Luminesk' okazis en Kleve (Germanio)

Luminesk'? Ĉu vi ne aŭdis aŭ legis pri ĝi? Luminesk' estas la nomo de la nova Silvestra Esperanto-renkontiĝo organizata de Germana Esperanto-Asocio en Germanujo, kaj taksata kiel daŭrigo de la tradicio de multaj sinsekvaj jaraj Internaciaj Festivaloj (IF) organizitaj far HDP ĝis antaŭ 2 jaroj. Mi povas diri, ĝi estas dece kaj taŭge organizita sekvo, kio strebas al komparoj de renkontiĝoj de antaŭaj jaroj.

Pasint-jarfine mi estis aliloke, nun mi kaptis la okazon revidi multajn konatojn kaj ekkoni novajn, por festi kun ili la jarfinon 2016 per Silvestra bufedo kaj balo, kaj komune komenci ĉi novan jaron 2017 inter Esperantistoj. Mi partoprenis la tutan semajnon kaj ĝi plaĉis al mi.



Jen nova maniero turismadi, ne per kutima aŭtobuso sed per malrapida traktoro-kaleŝo. Tiel ni vizitis ekologian farm-bienon. Interne de la kaleŝo estis tablo, kie eblis almeti bieron kaj aliajn trinkaĵojn. Ĝi multe kontribuis al varma interna etoso.

La farmestro klarigis sian biologian entreprenon. Li bredas bovinojn, produktas ties furaĝon, vendas lakton, fromaĝon, viandon kaj legomojn sen artefaritaj kemiaĵoj. Poste ni trarigardis etan vilaĝon ĉe bordo de rivero Rejno. La vilaĝestro rakontis la 800-jaran historion kaj la konstruon de grandaj digoj.



Rimarkindan faktan mi trovis, ke kelkaj homoj eĉ venis por partopreni unu ĝis du tagojn jam en 2016, aliaj faris same en 2017, kaj iuj venis "nur" je Silvestro kaj Novjaro.

Preterpasis do multaj parta-tempaj partoprenantoj kompare al la solida partoprenantaro de la tuta semajno, kaj do eblis interparoli kun multaj homoj, kiuj ankaŭ bedaŭris ke ili ne povis resti.

La Silvestra bufedo estis bonkvalita, la etoso agrabla, kaj oni denove, sendiskute, aranĝis la tradicion malfermi la silvestran balon per la pola par-danco Polonezo. Poste ni aŭdis kantojn far Guillermo kaj dancis kun li la kubajn movojn, dum Rob prizorgis en la novjara nokto la bonkvalitan elekton de dancmuziko kion ĝuis multaj.

Dum aliaj vesperoj ni aŭskultis inter alie la akordionajn sonojn far Kees, spektis interesajn prezentojn kaj kontribuojn el nia partoprenantaro, kaj miris pri ĝi.

Programeroj estis tre diversaj; inter ili prelegoj fakaj kaj pli leĝeraj. Do eblis kontentigi multajn gustojn. Mi faris vojaĝon en Portugalio per la rakontoj kaj bildoj de Ulrich, oni faris frandaĵojn sub la gvido de emerita-ambasadora edzino Barbara, oni dancis linie (Benia) kaj ronde (Martin), kaj vespere fervore partoprenis la instruojn de Guillermo danci je kubaj ritmoj. Mi prizorgis interbabilan diskutgrupon pri Filozofiumado. Post la vespera programo funkciis Gufujo kun riĉa oferto de poemoj, tra fabeloj al ŝercoj kaj spritaĵoj, gvidata far Joŝi kaj Dieter.



Ekskursoj estis per buso al apuda Nimego, prizorgita far la Nimega grupo, kaj alian tagon ni vizitis la regionon. Amuza veturigilo tiam estis la longa tendoĉaro tirata de traktoro. Ne gravis la malvarmega tamen sunplena frosto-tago ĉar la interno de la ĉaro estis hejtgita, ne gravis la malrapideco, ĉar ni ĉiuj sidis apud granda tablo larĝa, ĉiam interbabilantaj unu kun la aliaj. Mi trovis ĝin agrabla grupa sperto, kontrasto al la kutimaj busvojaĝoj dum kiuj oni ofte nur parolas kun hazarda najbar(in)o je flanko sidloko.

La adiaŭan vesperon koncertis Jonny M., kiu rapide kapablis krei gajan etoson per lia vigla prezentado de liaj rege-stilaj kantoj. Verdire, kutime mi ne tre ŝatas la rege-stilon, ĉefe kantatan en la angla, sed ĉifoje mi tuj estis katenita ĉar Jonny kantas tekstojn en Esperanto bone aŭskulteblajn, foje profundajn, ofte rekoneble (junular) movademajn. Sperto mojosa!

Jen konciza impresio mia de tiu ĉi Luminesk'. Aliaj verŝajne rakontos aliajn aferojn.



Ĉu ni revidu nin venontan Luminesk'?

Ĝi certe

okazos post Kristnasko jarfinon 2017/2018, kaj kiam mi ekscios pli da detaloj, mi komunikos volonte al vi!



Korine Cheizoo
3 februaro 2017

Revenis la tradicio enkonduki la silvestran balon per prezentado de pola tradicia danco, Polonezo. Tamen ĉi-jare la ekzercado estis multe pli simpla kaj la prezentado pli spontana. Ĉiuj danĉparoj ricevis varman aplaŭdon de la ceteraj spektantoj.

Ankaŭ diligente korusanoj bone ekzerciĝis por prezenti siajn kantojn. Okaze de internacia vespero la tri-voĉa kanto "Donu al ni pacon" kortuŝis la publikon.



La dua tuttaga ekskurso okazis jam en la nova jaro al la proksima nederlanda urbo Nimego. Ĝi estis fondita antaŭ 2 mil jaroj de la romianoj. Lokaj esperantistoj nin bonvenigis, poste s-ro Pit de la loka grupo gvidis nin tra tiu ĉarma antikva urbo. La urbo-centro estis komplete detruita dum la dua mondmilito kaj rekonstruita. Fine, antaŭ la reveno al Germanio la grupo regaligis ĉiujn ekskursantojn en loka kafejo.



Korine iniciatis viglan diskutadon kun la titolo "filozofiumado". Ŝi kelkfoje uzis kartojn kun kaŝitaj filozofiaj demandoj, tiamaniere ĉiuj partoprenantoj volonte provis respondi kaj krei konversacion.

S-ro Brandenburg, eksa multjara ambasadoro en Moskvo, prelegis pri politikaj rilataj inter Rusio kaj Germanio. Laste li labor-oficis kiel ambasadoro en Portugalio. Tial alia lia prelego temis pri la ĉarma urbo Lisbono.



Lia edzino Barbara prezentis la sekretojn el kuirejo de ambasadorejo. Pluope aktivis pluraj "kuiristinoj" por prepari koktelajn manĝaĵetojn kaj frandaĵojn. Ĉiuj plezure gustumis ilin kaj ankaŭ ŝatis la faman portugalan dolĉan Porto-vinon.

En la lasta vespero koncertis Jonny M. kaj prezentis sian novan albumon "Kreativa". Li estas konata en la junulara movado.

Certe en tiu raporto multe estas forgesita, tial ni varme rekomendas al vi mem sperti la amikan etoson de Luminesk en la fino de ĉi jaro, supozeble ekde la 28a de decembro.

Raportas Andreo
kaj Korine,
fotoj de Andreo

La 15a Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken 27.12.2016-3.1.2017

Post unu jaro ni denove renkontiĝis en Saarbrücken por kune festi la Novjaran Renkontiĝon en gaja kaj amika etoso. La evento estas organizata de la asocio EsperantoLand. La ĉeforganizanto Lu Wunsch-Rolshoven kun pluraj helpantoj pretigis interesan jarfinan semajnon. Pri la programo zorgis Betti Maul, pri la tekniko okupiĝis Pjotr de Mulder kaj Klaus Rumrich. Al la programo multe kontribuis ankaŭ Ines kaj Christoph Frank. La NR-on partoprenis 196 geesperantistoj el 15 landoj ne nur el Eŭropo. Ĉeestis multaj familioj kun infanoj kaj gejunuloj ĝis 19 jaraĝaj.



Riĉa programo kontentigis ĉiujn ĉeestantojn. Ni povis ĝui diversajn prelegojn, diskut-rondojn, labor-grupojn, atelie-rojn, kvizojn, divers-nivelajn Esperanto-lingvokursojn. Oni povis lerni ankaŭ la hispanan. Ne mankis riĉa libroservo, variaj tabloludoj, vesperaj filmoj, malstreĉiga gimnastiko aŭ ritme vigla zumbo, kurso de tango kaj ĉendancado. Intereson vekis plibonigo de memoro per la japana lingvo, budaisma plenkonscia meditado, balada kulturo de Feroaj insuloj, la libroarto-Orimoto kaj aliaj programeroj.

la homoj neas sciencon, kien iros Eŭropo post la breksiĝo, pri la dana filozofa Martinus, pri liberalaj religioj, pri Duolingo, pri la Edena ĝardeno, pri justa komerco, pri gravitaj ondoj, pri Esperanto en



Afriko, pri perspektivoj de Eŭropa Unio kaj eĉ pri bano, duŝo kaj necesejoj tra la mondo.



Interesis nin matematika prelego pri senfineco, ĝiaj problemoj kaj paradoksoj, la historio de Kubo kaj Usono, la vivo sur strangaj mondoj kaj la vivo sur la orient-frisaj insuloj.

Ni diskutis pri monda politiko, pri enmigraĵoj, pri disvastigo de Esperanto, pri ReVo (Reta Vortaro). La projekton "Unu leciono pri Esperanto, por ĉiuj lernejoj" proponis Lu Wunsch-Rolshoven. Pri la demando "Ĉu normalaj infanoj ankoraŭ ekzistas?", prelegis kaj diskutis Martin Markarian. Pri "Ĉu reguligita laŭleĝigo de kanabo estas dezirinda?" raportis kaj diskutis Markos Kramer. Gijom'Armid organizis seminarion pri "Vivi por feliĉi aŭ feliĉi por vivi?"



Okazis tradukateliero kun Brian Moon kaj István Ertl, konstruo de sorobano kun Kimie Markarian, Riskokvizo kun Edy Van den Bosch, scienca kvizo por teamoj kun eksperimentoj kun Klaus Rumrich, skeĉoj de Mirejo Grosjean okaze de la jaro de lernado.





Ni spektis bildprezentojn de Amri Wandel pri Slovakio, Slovenio, Montenegro kaj pri *Petra*, la antikva mistera ĉefurbo en la jordana dezerto. Bernard-Regis Larue gvidis nin tra parkoj de *Yellowstone* kaj *Colorado* en Usono. Ulrich Brandenburg rakontis kaj montris interesajn bildojn pri Portugalio, kie en la jaro 2018 en Lisbono okazos la 103-a Universala Kongreso. Li donis al ni emon partopreni ĝin.



Ankaŭ la infanoj ĝuis tre riĉajn programerojn en multaj atelieroj. Interesis ilin pretigado de pilkoj por ĵonglado, origamio, fabrikado de strigoj kaj aŭtoj el kartono, pupetoj el ŝtofoj. Ne mankis rostado de bananoj kun ĉokolado, preparado de filmeto farita el fotoj, poŝtranĉiloj, kantado, ĵonglado, feltumado kaj ornamo de kandelingo.

La plej malgrandaj kun entuziasmo sekvis Mazi-kurson. Plaĉis al ili ludado kun samaĝuloj kaj libera petolado.



Dum la paŭzoj virinoj trikis, iuj komputilis, legis, kartludis aŭ babilis ĉe glaso da vino, biero aŭ kafo.



Estis prezentitaj fotoj el la pasintjara NoRo, beletra Almanako. Vespere ni ĝuis pup-teatraĵon: “Avino! kriĉas Filipino” fare de Christoph Frank, koncerton de ĴeLe kun akompano de la kubo Geomar.

Plezure koncertis ankaŭ Gijom'kaj Kim. Dum la Internacia vespero prezentiĝis niaj talentuloj. Ni ĝuis pian-, kontrabas-, violon-, kaj flut-ludadojn, ĵongladon, ĥor-kantadon, dancadon, kanĵikvizon kaj skeĉojn de István Ertl. Ĉe la fino Lu Wunsch-Rolshoven dankis al ĉiuj kontribuantoj kaj al la partoprenintoj de la aranĝo.



Gaje ni bonvenigis la Novan jaron per tosto, kisoj kaj bondeziroj de ĉio bona por la jaro 2017, esperante denove renkontiĝi jarfine en NR.



renkontiĝi jarfine en NR.

Liba Gabalda



Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Secrétaire adjoint</i>	S-ino Catherine KREMER 20, Voie Sacrée 55100 VERDUN	03.29.85.05.09 03.02.13.01.32	catherine2.kremer@laposte.net
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.69.54.46.93	andreo.ag16@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Assesours	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Jacques PINEDA	03.89.42.88.54	pineda.ventron@gmail.com
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Madette AST	03 87 01 32 85 06 70 94 11 84	madette20@hotmail.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net

Abono al La Informilo →	17 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← <i>Paiement par chèque au nom de</i>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← <i>Paiement par virement au compte</i>
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. KONSTRUADO-kajero	15. Staĝo en Colmar	<p>ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par l'imprimerie Sprenger</p>
2. Luminesk en Kleve	16. Agad-raporto	
3. Luminesk en Kleve	17. Kolombio	
4. Luminesk en Kleve	18. Nova urbo	
5. Luminesk en Kleve	19. Nova urbo	
6. Novjara renkontiĝo	20. Tossa de Mar - Frajburgo	
7. Novjara renkontiĝo	21. Printempo Grezjono	
8. Komitatanoj kaj Menuo	22. Enigmo kaj distraĵo	
9. Angulo de la prezidanto	23. Abono kotizoj + libroj	
10. Libro-servo	24. Rozoj en Esperantujo	
11. Libroj	25. MES en Les Issambres	
12. Carlo + KONSTRUADO-kajero	26. MES en Les Issambres	
13. Fernando + proverboj	27. MES en Les Issambres	
14. Staĝo en Colmar	28. Fotopaĝo IFEF-turismado	

Karaj gesamideanoj



La jaro 2017 estas tre oportuna jaro por niaj regionaj samideanoj!

Favora momento por denova malfermo al la mondo pro diversaj aranĝoj, kie renkonteblas geesperantistoj diverslandaj, kio eblas iom forgesi siajn ĉiutagajn zorgojn kaj spiri iom da aero elekstera.

Se vi vere ŝatas ekzotikon, partoprenu la UK-on en **Seulo**: <http://www.uea.org/> kongresoj

Multe pli proksimas la **IFEF-kongreso en Colmar**. Ĉeestos samideanoj el pli ol 20 landoj, ne nur fervojistoj! **Eblas semajnfina partopreno por EFE-anoj**.

Konsultu <http://esperanto.france.est.free.fr/>

Iom poste okazos la franca kongreso en **Mandres les roses** apud Parizo:
kongreso2017.esperanto-france.org.

Kaj poste, pentekoste, niaj najbaraj **BAVELANOJ** vin atentos en **Frajburgo**, kie ili organizis la germanan nacian kongreson:

<https://www.esperanto.de/eo/gea>

Ĝuu la restadojn! E.L.

Pola retradio: daŭre profesieca!

Jam pli ol 600 elsendojn produktis Pola Retradio ekde sia lanĉo post la bedaŭrinda ĉesigo de la Esperanto-elsendoj ĉe la ŝtata pola radiofonio. Feliĉe tuj eklaboris anoj de la malnova skipo kun la helpo de novaj fakuloj pri informadiko. La mesaĝoj de aŭskultantoj, kiuj el la tuta mondo reagis al la elsendoj, daŭre insitas pri la modela alta lingva nivelo de la elsendoj.

Multajn informojn vi trovos sur la diversaj retpaĝoj de la redakcio <http://pola-retradio.org/>.

En 2016 riĉiĝis signife la unuopaj rubrikaj de la paĝaro per ĉerpitaj el la unuopaj elsendoj eroj paralele aŭskulteblaj kaj legeblaj. Ĉe la fino de la jaro en ili troviĝis 469 novaĵoj, 253 kulturkronikaj kaj 235 sciencaj informoj, 123 felietonoj kaj krome 124 interparoloj, intervjuoj, sonscenoj. La unuopaj informoj estas akompanitaj de fotoj kaj krome la elsendoj audiĝas ankaŭ en jutubo?

Aŭskultu kaj reagu!

Cetere: ĉu vi scias, ke ekde 2012 la tuturba varsovia lusistemo de bicikloj nomiĝas VETURILO?????



LITERUMILOJ KAJ ORTOGRAFIA KONTROLADO EN ESPERANTO

Lingvoilo estas liber-koda plurlingva programo por kontroli ortografion, gramatikajn erarojn kaj stilon de Esperantaj tekstoj. Ĝi funkcias ankaŭ por pluraj aliaj lingvoj.

"Lingvoilo" atentigas ankaŭ pri eraroj, ne trovitaj per simpla literuma kontrolilo.

Estas avantaĝo de Lingvoilo, ke oni povas uzi la programon ne nur en ĝia retejo, sed oni povas elŝuti kromaĵon (*suplementan aldonan programeton*) por sia retumilo. Post la instalado sufiĉas nur marki iun tekston per la muso, kaj la kromaĵo povas tuj indiki la eventualajn literumajn aŭ gramatikajn erarojn... (!) Prizorganto kaj programisto de Lingvoilo estas Dominique Pelle. - Dankon al li!

Adreso de Lingvoilo: <https://languagetool.org/eo/>

Ekzistas ankaŭ du aliaj, bone funkciaj literumiloj kaj kontroliloj de ortografio:

– **Lingvohelpilo** ĉe <http://visl.sdu.dk/lingvohelpilo/>

– **Esperantilo** ĉe <http://www.esperantilo.org>



El nia libroservo



Informoj

La libroservo partoprenos la venontan komunan regionan staĝon en Colmar, la 19/20 21ajn de majo 2017 (kadre de IFEF kongreso).

Ĉiuj titoloj de la libroservo atendas vin tie. Tamen, se vi volas esti certa trovi deziratan libron, (eĉ se vi ne aĉetos ĝin), informu min per mesaĝo al libroservo.

efe@laposte.net

Ĝis baldaŭ !

Jean-Luc Thibias



Nova libro (...de Trevor Steele):

Amo inter ruinoj, Romano, Trevor Steele, F. E. L. (2016), 232 paĝoj. 16 €. Dum la fina periodo de Sovetunio, amikiĝo inter aŭstraliano kaj estonino frontas ĉiajn obstaklojn. Ĉu pluvivos feliĉo?

Travis Siganoff, aŭstralia esperantisto, redaktis artikolojn por la lialanda komunista gazeto *Sentinel* kun iom post iom ŝrumpanta legantaro. Iam li decidis viziti la ruiniĝantan Sovetunion. Vizon al la landego li ricevis nur, kiam li anoncis, ke li dezirus instrui tie „biznez-ingliš“.

Li decidis ŝanĝi ĉiujn dolarojn al rubloj, ĉar li volis elturniĝi sen okcidentaj de la sovetanoj sopirataj devizoj. Lia vizito komenciĝis en Ukrainio, en Kievo, kie li spertis la unuajn signojn de la disfalo de la komunista imperio kaj la aperon de ukraina naciismo. Kompreneble helpis lin la kono de Esperanto, kiu ebligis rektajn kontaktojn kun loĝantaro, kies lingvojn li ja ne konis. Li malkovris korupton, mafiajn ekonomiajn metodojn kaj malesperiĝon de popolo, kiu ne plu kredis je la en okcidento daŭre admirata Gorbaĉov.

Samaj emoj al sendependiĝo sentiĝis en Kovno (Litovio), la naskiĝloko de Klara Silbernik-Zamenhof. Tie juna ekonomie sukcesa (ĉu honesta?) juna esperantisto malavare donacadis monon al la loka Esperanto-klubo.

Novan bonege pagatan postenon de instruisto de la angla oni proponis al li en Talino, en Estonio, kie li de ankoraŭ pli proksime observis la sendependistajn aktivistojn, kiuj timis la revenon de la antaŭ-Gorbaĉovaj rigiduloj. Tiam okazis la feliĉe malsukcesinta puĉo.

En ĉi tiu nova verko Trevor Steele rememorigas pri tiuj dramaj jaroj kun alternado de espero kaj malespero. Laŭlonge de la rakonto oni retrovas la kutiman Trevor Steele, la batalanton por homaj rajtoj kaj por respekto al la naturo.

Sed refoje: ne temas pri historia eseo, sed pri romano, en kiu ĉiuj eventoj plej rekte koncernas la vivon de la renkontitaj homoj. Aŭstralion li forlasis post eksedziĝo: lin forlasis lia edzino Belinda. Kievon li alcelis, ĉar tie vivis la bela esperantistino Marina, kun kiu li korespondis. Surprizoj atendis lin ĉe ŝi! En Estonio li renkontis Virve, alian esperantistan belulinon, kiu ege gravos en lia vivo! Vi cetere rimarkos, ke la plej multaj kuraĝaj herooj de la rakonto estas virinoj kaj Travis – Trevis pro tiea prononco – admiras la kuraĝon de tiuj batalantinoj. Leginda grava verko, en kiu Esperanto plej trafe kunrolas.

E.L.



Por mendi librojn:

- Vi sendas vian mendon
 - per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE
 - per ret-poŝto al "libroservo.efe@laposte.net"
 - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
- Vi baldaŭ ricevos viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)
- Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al "libroservo 2800-76 H NANCY" (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo "libroservo" sendita al la adreso de la libroservo.
Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al "LIBROSERVO"
IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97
BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.

Mendilo		Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino		
En	la	Subskribo:

**La pupo (Lalka) Bolesław Prus (Świdnik – Bjalistoko – Ĝurĉevac 2016)
Traduko de Tomasz Chmielik**

En ĉi tiu romano, kiu disvolviĝas en la jaroj 1878/1879 en Varsovio, la en sia junaĝo politike aktiva aŭtoro Bolesław Prus prezentas al ni tri gravajn rolulojn personigantajn tri politikajn sintenojn, kiuj reliefigiĝas en la tiama pola socio. La romantika idealista komizo Ignaco Rzecki revas pri la sinsekvaj „Napoleonoj“ - la franca imperiestro ja batalis kontraŭ komunaj malamikoj, t.e. la prusoj kaj la rusoj! La riĉa komercisto Stanisłavo Wokulski, amiko kaj dunganto de Ignaco, estas pli realisma, kvankam lia politika sinteno ne tre klaras. Aldonendas Ochocki el la generacio de la novaj pozitivistaj idealistoj. Sed iu Henriko Ŝlangbaum, kiu aĉetos la galanterian magazeno de Wokulski, ignoras la idealismon, li reprezentas la formikan klopodanton, kiu celas sian prosperon. Por li „la mono estas rezervo por la plej inda potenco en la naturo, ĉar por homa laboro. Ĝi estas sezamo, antaŭ kiu malfermiĝas ĉiuj pordoj ...“.

En Varsovio tiuepoke kunvivis la lastaj generacioj de malriĉiĝantaj nobeluloj same kiel kreskanta socio de burĝoj, kiuj iom post iom riĉiĝas kaj iel sopiras je la prestiĝo de la nobelaro: papiliumas la invititoj en somerdomoj aŭ dum vintraj baloj. Pli modeste la loĝantaro de ludonita domo plej trafe ilustras la ne ĉiam tre facilan kunvivadon de la socie diversaj luprenantoj. Ankaŭ en la entreprenoj ne ĉiam pace kunlaboras la dungitoj. La leganto samtempe malkovras la situacion de la judoj en socio, kiu iĝas pli kaj pli antisemita, suspektanta kaj la malriĉajn kaj la riĉajn judojn. Vojaĝo de Wokulski al Parizo ankaŭ en la franca ĉefurbo pentras monavidulojn, kiuj sin altrudas en luksaj hoteloj kaj provas profiti diversrime de la monon de la riĉaj hotelaj gastoj.

Laŭ tiama kutimo en Europo la romano aperis unue felietone en 1887 en la gazeto *Kurier Codzienny* (Ĉiutaga Kuriero), poste libroforme en 1889. La felietoneco ja sentiĝas en la iom longece kaj fadene rakontata amo de Wokulski al la nobelino Izabela Łęcka, sed la historia kaj sociologia bildo de la tiama varsovia socio – tiu de la juna Zamenhof – estas tiel interese pentrita, ke la 640 paĝojn de la belege bindita libro oni scivoleme englutas. Cetere: por ne-poloj tio ne eblus sen la multnombraj interesaj kaj nepre necesaj notoj aldonitaj de la tradukisto. Kromaj klarigoj legeblas en la postparolo.

La romano estas tradukita al 20 lingvoj. Ĉi tiun laste aperintan tradukon al Esperanto ni dankas al la eksterordinara laboro de nia tradukmaŝino, Tomasz CHMIELIK. La verko meritas lokon en la biblioteko de ĉiu samideano, kiu deziras koni pli precize la socion, en kiu vivis la juna Zamenhof.

Nepre leginda verko de ĝisosta samideano!

Home en senhomeco Martin Stuppnig Eldonejo Kava Pech


Stuppnig (naskiĝinta en 1925) kiel 18-jarulo estis vokita en la nazian armeon Wehrmacht. En tiama Jugoslavio kaj Italio (Monte Cassini) li plurfoje estis vundita kaj kiel angla militkaptito deportita al Afriko. Profesie fervojisto li ankaŭ estis aktiva Esperantisto. Tiun 2011 verkitan biografion en Esperanton tradukis Jozefo Horvath. Post tralego de la originala germanlingva versio tiu ĉi skribis al la aŭtoro: *“Mi devis reteni min, pro urĝaj laboroj plulegi vian libron, kiun mi komencis gustumi jam en Tata. Mi ne povis ĉesi. Dume mi nur manĝis kaj pisis, faris nenion alian.*

Via stilo estas tiel interesa, ke ĝi daŭre katenas onin. Ĝi simple ne lasis min demeti la libron. Kvazaŭ vi babilus kun mi, kaj ja ne pri tedaĵoj! Multon mi eksciis pri vi kaj viaj riĉegaj spertoj. Aparte plaĉis al mi via humana sinteno al la malfacilaĵoj de la vivo, via morala konduto.


Vi eĉ unu superfluan vorton ne skribis. Unu frazo allogas onin legi la sekvan! Kaj aparte plaĉis al mi la finaj vortoj pri la interrilato de la du monaĥejoj, kiuj simbole kunligas du punktojn de via vivo, kaj plej trafe esprimas vian optimismen vivkoncepton.

Dankon, Martin, por la plezuro! Vi mistrafis vian profesion, eble vi devus fariĝi roman-verkisto.“

Edmond LUDWIG



Informo: Martin Stuppnig partoprenos la 69-an IFEF-kongreson en Colmar (16-a ĝis 23-a de majo 2017.



Jen kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi, en malfacila periodo, kiam en Eŭropo furiozis la dua mondmilito.

Lia patro Arturo, itala esperantisto, kaj Vera, latva esperantistino, ja konatiĝis koresponde pere de Esperanto kaj geedziĝis en Italio, sed la Dua Mondmilito ilin disigis kaj ilia bebo Carlo iĝis Kārlis en Latvio, dum la patro estis malliberulo en nazia lagero. Nur plurajn jarojn post la milito Kārlis iĝis denove Carlo en Italio. Sekvis plenkreskula vivo en Germanio kaj Svislando.

La edzino de Carlo, Anne-Lise Nicolodi-Nielsen, danino kaj esperantistino, iniciatis la eldonadon de tiu libro en la germana kaj dana lingvoj.

Tiam Edmond Ludwig leginte la libron tuj ekhavis la emon ĝin traduki al Esperanto.

La eldono de 2016 estis tute elĉerpita en lasta februaro, tial ni presigi novan serion kaj plezure informas vin, ke la libro estas denove akirebla.

92-paĝa libro je	12 €
Afranko por Francio	2,80 €
al Eŭropo	1 €



Ambaŭ libroj estas mendeblaj ĉe nia kasisto:
André Grossmann,
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM

Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY

KONSTRUADO
kajero de TAKE 2017

Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
Wintzenheim Francio

Okaze de la IFEF kongreso en majo 2017, la teamo de TAKE dediĉas specialan numeron al fervojaj vorkoj. La temo plej traktita estos stacidomoj, kiuj koncernas ambaŭ profesiajn mediojn, la fervojistan kaj la konstruistan.

Jen la KONSTRUADO-kajero de 2017 akirebla okaze de tiu kongreso kaj ankaŭ mendebla ĉe nia kasisto por 8 eŭroj (sendkostoj inkluzivitaj).

N ^o	Titolo	Aŭtoro
1	Enkonduko	La redaktinto
2	La nova tunelo de Sankta Gotardo en Svisio	Pierre Grollemund (FR)
3	Rekonstruita stacidomo Ŝinĉi post la cunamo de 2011 en Japanio	HORI Jasuo (Japanio)
4	La stacidomo de Colmar , historia respiegulo.	Pierre Grollemund (FR)
5	Arkitekturaj juveloj: la polaj stacidomoj de Gdansk kaj Wroclaw	Pierre Grollemund (FR)
6	La stacidomo de Zagreb kaj ties trafiko	Zlatko Hinšt (Hr)
7	La nova stacidomo de Vieno	Walter Klag (Aŭstrio)
8	La stacidomo de Stuttgart	Manfred Westermayer (DE)
9	La 5 stacidomoj de Saint-Etienne	Pierre Grollemund (FR)
10	La stacidomo de Perpignan	Salvador Dali!
11	Fervojaj stacidomoj en Ĉilio	Henrique Fernandez
12	La kastelo Gresijono	Pierre Grollemund (FR)

Forpasis Fernando!

La vivradikoj de Fernando (oficiale: Ferdinando) NKANI troviĝis en Afriko, en Demokratia Respubliko Kongo kaj Angolo. Fuginte al Eŭropo pro persekuto li ricevis restadpermeson en Francio kaj loĝis dum kelkaj jaroj en CADA (Centro por Azilpetantoj) de Colmar, poste ĉe privatuloj antaŭ ol trovi kunloĝadon. Li forpasis pro subita kor-atako la 14-an de marto 2017.

Fernando estis tre diskreta persono, kiu aktivis dum jaroj por CARITAS en Colmar. Li ankaŭ kreis la asocion Eŭropa Afrika Solidareco, kiu preparis projekton por konstruo de profesia lernejo en Angolo kaj pri plantado de moringo. En 2016 li sukcesis vojaĝi al Angolo por antaŭenigi sian projekton.

Krom la kvar lingvoj, kiujn li flue parolis, li ŝategis Esperanton. Li organizis du reklamajn aranĝojn por Esperanto en Colmar kaj partoprenis en diversaj asocioj kaj Esperanto-aranĝoj lokaj, regionaj, naciaj kaj internaciaj. Memoru pri li.

La komitatanoj de Mulhouse-Esperanto, EFE kaj TAKE



Tro plena cerbo.

Mi ŝatas tion! Mi sentas min pli bonsana nun!

La homoj ne malkreskas cerbe kun la aĝo, sed tio forprenas de ili pli da tempo por memori pri faktoj, ĉar ili havas pli da informoj en sia cerbo, laŭ sciencistoj.

Same kiel komputilo luktas, kiam la malmola disko estas tro plena, same la homoj bezonas pli da tempo por aliri la informojn, kiam iliaj cerboj estas plenaj.

La esploristoj diras, ke tiu procezo de malrapidiĝo ne estas la sama afero kiel "malevoluo en akiro de konoj".

La homa cerbo funkcias pli malrapide en la granda aĝo, deklaris Dr Michael Ramscar, sed nur ĉar ni stokis pli da informoj laŭlonge de la tempo.

La cerboj de la maljunuloj ne estas malfortaj, male, ili tutsimple scias multe pli.

Plie, la olduloj venas ofte en alian salonon, por serĉi ion kaj, kiam ili tien alvenas, ili staras tie, demandante sin, kion ili serĉis. Ne estas problemo de memoro, temas pri natura maniero, por ke la olduloj pli gimnastiku.

NU! nun, kiam mi serĉas vorton aŭ nomon, mi ekdiras: "mia disko estas plena".

Mi certe havas aliajn geamikojn, al kiuj mi devus sendi ĝin, sed, nuntempe, mi ne memoras pri iliaj nomoj.

Do, bonvolu komuniki tion al viaj geamikoj, ankaŭ ili povas esti miaj geamikoj.

Bonan semajnon! Oni memoras, ke oni amas vin!.

(traduko de Catherine Roux-Harelle, kontrolita de Ginette Martin)

LAZARO LUDŬIKO ZAMENHOF

proverbaro
esperanta

BELETRAJ KAJEROJ


Proverboj

- ◆ Lernu juna, por esti saĝa maljuna.
- ◆ Kontentigi ĉiujn eĉ anĝelo ne povas.
- ◆ Kiom da kapoj, tiom da opinioj.
- ◆ Laboro kaj pacienco kondukas al potenco.
- ◆ Li atendas, ke la okazo venu al lia nazo.

En la retejo de Rob Keetlaer vi povas trovi 2120 proverbojn en Esperanto.

Jen la plej bona reta proverbaro:

WWW.proverbaro.net



MULHOUSE-ESPERANTO kaj

esperanto

France-Est

en amikaj rilatoj kun **BAVELO**
invitas vin al la :

81a Regiona Staĝo de Esperanto la 19 - 20 - 21ajn de majo 2017
en la hotelo Primo Balladins
5 rue des Ancêtres 68000 COLMAR

Nia ĉi-jara regiona staĝo okazos en Colmar, en la kadro de IFEF-kongreso, la internacia kongreso de la fervojistoj. Ni povos ĝui la samajn programe-rojn de vendredo ĝis dimanĉo de tiu kongreso. La surloka organizado estas prizorgata de la grupo de Mulhouse kun turisma gvidado fare de Edmond Ludwig.
Por la distra vespero ni ĝuos la koncerton de Grazia Barboni el Italio.
Krome estas ankaŭ ebleco aliĝi al la ekskursoj de la postkongreso.



Provizora Programo:

Vendrede 19-an de majo 2017

- 14a -18a Ekskurso D2 – Fervoja muzeo Mulhouse
- Poste Vespermanĝo (libera)
- 21a - 23 Kultura kaj dancvespero kun **Fernando** salono Catherinettes

Sabate 20-an de majo 2017

- 9a Libroservo funkcias, Catherinettes
- 9a30 Vizito al la malnova urbo
- 10a - 12a E-kurso en la hotelo
- Poste Tagmanĝo (libera)
- 14a - 18a Ekskurso D3 – Kaysersberg, Riquewihr, Hunawehr - Ĝardeno de vivantaj papilioj
- 20a Kultura vespero - **Koncerto de Grazia Barboni**, Italio, en Catherinettes

Dimanĉe 21-an de majo 2017

- 9a Libroservo funkcias, Catherinettes
- 9a - 12a Ĉefa prelego kaj aliaj prelegoj, salono Catherinettes
- 12a30 - 13a **Solena fermo**
- 13a Tagmanĝo (libera)
- 14a30 Komitat-kunsido de EFE



Turismaj programoj

Lunde 22-an de Majo

9a – 19a Tuttaga kskurso – Strasburgo, Obernai

Marde 23-an de Majo

9a - 18a

Haut-Koenigsbourg, Ribeauvillé, Hunawehr: Parko de la

cikonioj kaj lutroj, sen tagmanĝo: restoracio surloke;
ebleco pikniki

Merkrede 24-an de Majo

9a - 18a

Eguisheim, Ungersheim-Ekomuzeo sen tagmanĝo;
ebleco pikniki

Por pliaj informoj :
andreo.ag16@free.fr
Tel. 03.69.54.46.93
poŝtel. 07.82.21.97.34
Daŭre aktualigitaj informoj ĉe:
http://esperanto.france.est.free.fr

La aliĝ-kotizo entenas la partoprenon al elektita kurso aŭ prelego kaj al la distra vespero. Eksterlandaj partoprenantoj ricevos senpage nian bultenon **La Informilo** dum unu jaro.

Propono: Se vi deziras viziti la fervojan muzeon en Mulhouse vendrede post-tagmeze post la 14a, eblas rekte veturi al tiu muzeo. De la stacidomo de Mulhouse per tramo, direkto Lutterbach, aŭ Thann, haltejo Musée.

ALIĜOJ

Ĉef-aliĝanto abonanta "La Informilo"n aŭ loĝanta ekster Francio	30 €
Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilo"n kaj loĝanta en Francio	47 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)	18 €
Junulo inter 10 kaj 25 jaroj	12 €
Infanoj malpli ol 10 jaroj	3 €

Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.

Aliĝilo por la 81a Regiona Staĝo de Esperanto en Colmar la 19/20/21ajn de majo 2017

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Malpli ol 18 aŭ studento	Aliĝ- kotizo
1	ĉef-aliĝanto			
2	kun-aliĝantoj			
3				

Adreso

Telefono:

Ret-adreso:

Mi pagas per ĉeko per ĝiro al André Grossmann CCP 819 34 U Strasbourg, per internacia ĝiro al nia peranto en Germanio

Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo (krucumu)

Nombro da tranoktadoj en la hotelo Pri- mo Balladins inkluzive kun matenmanĝo	Kosto por unu nok- to kaj unu persono	Ven- drede 19	Sabate 20	Di- manĉe 21
1 lita ĉambro	49 €			
1 ĉambro kun granda lito por 2 personoj	62 €			
1 lito en 2-lita ĉambro	31 €			
1 lito en 3-lita ĉambro	24 €			
1 lito en 4-lita ĉambro	22 €			

Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :

André Grossmann
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM

Ĉekoj nome de:

André Grossmann
CCP 819 34 U Strasbourg
Internaciaj ĝiroj al: IBAN:
André Grossmann
FR6920041010150081934U036
69

BIC: PSSTFRPPSTR

Por Germanio al nia peranto:

je la nomo de: Hans-Dieter Platz.
(menciu la celon de via pago)

Poŝtĝirokonto:
918 56-676 (BLZ 545 100 67)

PGA Ludwigshafen

Pliaj informoj ĉe

André Grossmann:
andreo.ag16@free.fr
Tel. 03.69.54.46.93
poŝtel. 07.82.21.97.34

La diversaj tag- kaj vesper-manĝoj estas liberaj en restoracioj de la urbo, proksime de la hotelo aŭ de la salono Catherinette.

Vendrede 19.05 14a ĝis 18a	Ekskurso D2: Fervoja muzeo Mulhouse (veturado per buso ekde la hotelo)	22 €	
Sabate 20.05 14a ĝis 19a	Ekskurso D3: Kaisersberg, Riquewihr, Hunawihr-Ĝardeno de papilioj	18 €	
Lunde 22.05 9a ĝis 19a	Tuttaga ekskurso kun tagmanĝo – T1: Strasburgo, Obernai	40 €	
Marde 23.05 9a ĝis 18a	Haut-Koenigsbourg, Ribeauvillé, Hunawihr: Parko de la cikonioj kaj lutroj, sen tagmanĝo: restoracio surloke; ebleco pikniki	35 €	
Merkrede 24.05 9a ĝis 18a	Eguisheim, Ungersheim-Ekomuzeo sen tagmanĝo; ebleco pikniki	35 €	
	kotizo + tranoktoj. + Ekskursoj	Sume	
Pagenda	_____ + _____ + _____		

AGADRAPORTO ESPERANTO FRANCE-EST POR ESPERANTO-FRANCE Agad-jaro 2016

Laŭkutime agadis Esperanto France-Est en 2016:

- Pluaperis la federacia bulteno LA INFORMILO prizorgata de André GROSSMANN. Daŭre ĝi aperas kvarfoje jare, kaj papere, kaj elektronike. Plejparte kolore kun raportoj de niaj membroj ĉeestintaj Esperanto-aranĝojn en- kaj eksterlande.
- Kune kun la estraro de EFE la dinamika Esperanto-grupo de Nancy organizis la 22/23/24-ajn de Aprilo 2016 sukcesan printempan staĝon de Esperanto France-Est en Art-sur-Meurthe, apud Nancy. La vasta kaj komforta staĝejo dum kiu prelegis pri literaturo István ERTL, paroligis progresantojn Edmond LUDWIG kaj por la unua fojo instruis al komencantoj Catherine HEL. La profesia gvidistino Catherine KREMER prelegis pri la sekvoj de la Unua Mondmilito okazinta antaŭ 100 jaroj. Ŝi rakontis kiel la loĝantoj deziris rememori kaj rememorigi tiujn terurajn kaj tragikajn eventojn.
- La kvindekda partoprenintoj el Francio, Germanio kaj Nederlando ĝuis vespere la ĉarmajn kanzonojn de Nataŝa, akompanata gitare de sia filo ambaŭ venintaj de Svedio. La federacia kutima libroservo prizorgita de Micheline COLNOT kaj Jean-Luc THIBIAS estis je dispono de la legantaro. La la ĵus aperinta esperantlingva versio de la biografio de nia svis/itala samideano Carlo NICOLODI estis havebla.
- Pluraj membroj de EFE partoprenis la UK-on en NITRA (Slovakio).
- Dum la amika tago en junio la Frajburgo grupo proponis turismadon per telfero al Nigra Arbaro.
- Dum la german-franca ekskurso en septembro pluraj federacianoj vizitis kun niaj germanaj samideanoj la akvoelektrejon surrejnjan de Iffezheim kun klarigoj en Esperanto.
- En novembro la nun tradicia aŭtuna staĝo en Germanio organizita de Badenvirtembergga Esperantoligo (BAVELO) prezentis bukedon da prelegoj fare de Lu WUNSCH-ROLSHOVEN kaj Bruno FLOCHON pri informado/reklamado, Ramon Perera kaj Alois EDER pri la Hispana Prihereda Milito kaj la packontrakto de Rastatt, Manfred WESTERMAYER pri helpo al Tanzanio per Esperanto. Krome eblis sekvi diversajn kursojn kaj partopreni ekskursojn en la regiono. Deĵoris ankaŭ en Rastatt la libroservistoj de EFE jam aluditaj.
- 24 samideanoj el Germanio, Svislando kaj el nia federacio partoprenis la 10-an de decembro 2016 la zamenhoffeston organizitan de Michel BASSO kaj Edmond LUDWIG en La Forge, apud Wintzenheim, kie okazis distra posttagmezo kaj komuna manĝo. Matene la tuta grupo vizitis la Muzeon Albert SCHWEITZER en Gunsbach. Ege klera gvidisto prezentis kun entuziasmo la vivon de la fama teologo, filozofo, orgenisto, ĝangala doktoro. Li ricevis la Nobel-premion pri paco en 1953.
- Nia retejo <http://esperanto.france.est.free.fr/> montras fotojn de pasintaj eventoj kaj ebligas elŝuti aliĝilojn por niaj venontaj staĝoj. Konsulteblas la katalogo de la LIBROSERVO de EFE.

Edmond LUDWIG

La Printempa Semajno Internacia estas granda internacia renkontiĝo por la tuta familio. Ĝi okazas ĉiujare dum unu semajno ĉirkaŭ pasko ie en Germanio.

Por la 33a PSI ni atendas pli ol 100 partoprenantojn el pli ol 10 landoj, el kiuj minimume kvarono estos infanoj aŭ junuloj.

PSI estas precipe familia seminario. La programo celas kontentigi samrajte plenkreskulojn, junulojn kaj infanojn. Sed tio ne ekskluzivas unuopulojn, ĉiu estas bonvena.

Por pli da informoj kun fotoj kaj aliĝ-ebleco:

<https://psi.esperanto.de/2017/>

La 33a PSI

10-a de aprilo 2017 ĝis 17-a de aprilo 2017
Essen

C. Montoya:

Kolombio – la popolo retrovas pacon.

Pacon en Kolombio kontraŭas* la interna milito, komencita antaŭ pli ol 50 jaroj. Ĝi estis unu el la plej longaj en historio kaj kaŭzis morton de 220,000 homoj (inter ili, pli ol 10,000 de la kontraŭ-infanteriaj ter-minoj. Tiu kunfrapiĝo kaŭzis evakuadon de pli ol 5 milionoj kaj 25,000 estis oficiale registritaj kiel 'desaparecidos' (malaperintoj). Ni ne povas konsideri tiun konflikton kiel nuran serion de bataloj en klare dividita milit-fronto. Ja ĝi, tra jardekoj frapas la tutan publikan vivon: kulturon, ekonomion, edukadon; ĝi vundas familiojn kaj kripligas infanecon de tiuj plej junaj. Se iu vivas en lando, kies reputacion makulas perforto dum tri generacioj – tia homo devas eniri profundan transformiĝon, dum la pensado pri fido, sindono kaj dankemo ŝajne malaperis.



Cristina Montoya laboras kiel esploranto en socia komunikado kaj politika sciencoj ĉe Sophia Universitato

Tamen la milito ne ĉion detruis: naskiĝas multaj iniciatoj, homgrupoj kiuj laboras por rekonstrui la socian veftaron, kreemo kaj fido ke Dio akompanas homaron en ĉiu historia momento.



El verkaro de Ch. Lubich, Cristina rememoras iom da okazintaĵoj kiuj fortigis multajn homojn en Kolombio, lando disŝirata per sangaj konfliktoj. Jen kelkaj rakontetoj kiuj priskribas la renaskiĝantan esperon.

Rosa vivas en periferio de Medellin (eo: Medeĝino), la pli ol 3-miliona urbego, kiun plef forte sufokas perforto kaj plago de organizita krimo. Ŝian filon murdis lia kolego, por kio la tipa reago estus venĝo. Sed homo aprezanta trezoron de la vivo kapablas grandanime pardoni. Tiu vundo konstante doloras kiel pikilo, tamen Rosa respondas per aktivado en la distrikto. Kaj tio signifas labori por la repaciĝo.

Alia persono nomiĝas Nubia kiu devis forkuri antaŭ tagiĝo, kiam la ribelantoj eniris la urbeton. Tiu graveda virino kun sia adoleska infano devis forlasi domon, kampojn kaj kion ajn ŝi posedis. Ŝiaj edzo kaj plejaĝa filo jam perdis la vivojn dum laboro sur ne sekurigita konstruaĵo. Rondo de fokolaraj geamikoj ŝin subtenis dum jaroj kaj tio donis al Nubia forton por komenci la vivon denove.

Gazeton forĵetitan al rubujo trovis viro 78-jara kaj legis belan historion de Kristnaska Festo. Kuraĝigis lin, ke la fokolara ideo pri unueco naskiĝis ankaŭ dum la milito.

Paco mem ne aperas el nenio, ĉar unue justeco devas esti restarigita; due - necesas trovi kaj forigi kaŭzojn de la konflikto. Tion faris Macudonio kaj Gabrielina kiuj sian malriĉan domon transformis je socia centro. En ĝi funkcias nun flegejo, postlerneja legĉambro kaj oficejo por arkitektura renovigo de la urbo. Alia estonteco devas esti kreita, komence kun edukado kaj bonvola divido de posedaĵoj por la plej malriĉaj familioj. La tiam konstruita infanĝardeno estas nun mezlernejo por 400 geknaboj kaj edukejo por plenkreskuloj kiuj laboros por la plurisma Kolombio.



Ekde tiam naskiĝis multaj iniciatoj kaj ekaktivis la homoj kiuj neniam antaŭe partoprenis en la socia vivo. Per sia karismo, Chiara Lubich antaŭvidis ke amo transiros multajn barilojn kaj pavimos la vojon al paco.

Same asertas Rafael Grasa, prezidanto de Internacia Pac-Instituto en Katalunio (nordorienta Hispanio), nuntempe laboranta kiel profesoro en Medeĝino: "Paco komenciĝas de popolo, en ties interpersonaj kaj grupaj rilatoj. Ĝia trajto ne estas stagna sed dinamika kaj tial paco tre gravas al kreado de harmonio en ĉiu homo, en socio kaj en la naturo".


Multaj atendas, ke la subskribota* en Havano traktato inter la kolombia registaro kaj FARC (Revoluciaj Armitaj Fortoj de Kolombio) helpas tiun nacion lerni denove la vivon en paco, spite al ĝia dolora pasinteco.

* Ĉi tiu artikolo aperis kelkajn monatojn antaŭ la traktato subskribita la 25an de aŭgusto 2016 en Havano kaj konfirmota sekvamonte en Kolombio.

Tra vasta panoramo de la forpasanta Roma Imperio, fadenas la romantika temo pri granda kaj pura amo. Romia patricio Vinicius enamiĝis al Ligia, kiu devenas de iu mezeŭropa gento.


En la unua jarcento, dum regado de la sadista Neron martire mortis miloj da kristanoj kaj la ĉefurbon detruis brulego. Li akuzis pri tio la kristanojn, kio efektivigis ilian persekutadon. Sekve oni komencis ĉasi la akuzitojn kaj la trovitajn grupigis en amfiteatra Koloseo por ke la sang-avidaj bestegoj (leonoj, ursoj, tigroj) ilin disŝiru kaj finvoru.

Inter ili troviĝis ankaŭ Ligia, katenita al uro sed ĵus last-momente alkuris fortega sklavo Ursus kiun mortigis la uron kaj savis Ligia. Kaj sekvas la mirinda priskribo de tiu amo:



"Vinicius flotis antaŭe kun peno, kontraŭ la tempofluo li batalis kaj laciĝis. Nun li aliĝis kun la ondo kaj kredis, ke ĝi portas lin al eterna silento. En sia imago, li ekvidis sin kunpreni la manon de Lidia kaj tiel ili ambaŭ foriros al ĉielo, kie Kristo ilin beatos kaj permesos ekloĝi en lumo trankvila kaj tiel potenca, kiel briloj de aŭroro. La homoj ĝis nun ne konis Dion, kiun ili povus ami; tial ili ne kapablis ami unu la alian. De tie venis ilia mizero ĉar kiel lumo radias de la suno, tiel feliĉo fontas el amo.

En momento, ili ambaŭ silente iris kaj ne povis plene enspiri tiun feliĉon. Enamiĝintaj reciproke, ili similis al du diaĵoj – belegaj kvazaŭ ilin printempo naskus kun floroj. Ligia ekrigardis al Vinicius kaj diris: - Mi estas ĉe vi. Kaj li respondis: - En sonĝo mi vidis animon vian".



Dume la pereonta Neron subiĝis senbride al perversaj plezuroj. Lian hedonisman vivstilon imitis la tiama aristokratio kaj tiel komenciĝis longdaŭra disfalo de la 500-jara imperio – unu el plej potencaj en historio de la homaro. La vortoj "quo vadis" fariĝis konataj kiam s-ta Petro volis eviti torturojn kaj provis fuĝi el Romo. Tiam survoje li renkontis Kriston, kiu iris en kontraŭan direkton – al Romo. Mirigita Petro demandis "Kien vi iras, Sinjoro?" (*Quo vadis, Domine?*) kaj ekaŭdis la respondon: "Al Romo, por esti krucumita denove". Tio skuis la konsciencon de Petro, kiu tien tuj revenis kaj mortis martire.



Busto de Sienkiewicz ĉe via Appia




Via Appia – la reĝino de antikvaj romiaj vojoj

Tiu antikva vojo hodiaŭ nomiĝas Via Appia kaj, sudoriente de Romo, promenas sur ĝi la turistoj serĉantaj trankvilan lokon ekster la brua urbego. Nur je 3-kilometra distanco de la urbocentro, sub la numero **via Appia 51**, oni povas eniri la ĉapelon "Domine Quo Vadis" kaj ekvidi la buston de Sienkiewicz.

La verko prezentas la etikan ideon, ke morala konduto venkas fizikan perforton.

"Quo Vadis" estis eldonita en 70 landoj, tradukita al 57 lingvoj, inkluzive la japanan kaj araban.



Bonege tiun libron esperantigis Lidia Zamenhof, la plej juna filino de la Majstro.

Laŭ opinio de kritikistoj, ŝia traduko estas "*glata, facilflua, bonege ekvilibrata kaj kristale klara*".

Ni ne disponis pri la E-versio, tial la komence aldonita citaĵo ne estas de ŝi tradukita.

Oni povas diri ke - pro sia universaleco - *Quo Vadis* kronis la verkadon de Sienkiewicz. Entute, ĝi aperis diverslande en pli ol 2,000 (jes, du mil) eldonoj. Tiu ĉefverko estis adoptita al teatraĵoj, inspiris multajn pentristojn kaj sur ĝia bazo oni kreis eĉ operon. Dum jardekoj, la romanon rigardis milionoj sur ekranoj - en italaj, usona kaj pola filmoj. En jaro 1905 H.Sienkiewicz ricevis literaturan Nobel-premion. Tiuj grandaj sukcesoj ne blindigis la verkiston, kiu restis sentema pri socia justeco kaj neniam forgesis pri la plej malriĉaj. Tiun malĝojan flankon de la vivo li prezentis ofte en siaj noveloj: *Skizoj per karbo* /*Szkice węglem*, *Joĉjo Muzikanto* /*Janko Muzykant*, *Bartek la Venkinto* / *Bartek Zwycięzca*, *Anĝelo* /*Jamioł*.



"Lasta preĝo de la kristanaj martiroj" – bildo de franca artisto J.L. Gérôme, pentrita en 1883.

Kiam eksplodis la unua mondmilito, Sienkiewicz forveturis al Svislando, tie li kunorganizis Helpan Komitaton por Viktimoj de la Milito sed mortis antaŭ ol tiu milito finiĝis. Post ok jaroj oni veturigis lian korpon al varsovia katedralo, kiun la germanoj detruis en 1944 – denove dum la mondmilito, tiam la dua. Komence de la pasinta jarcento, Sienkiewicz skribis al pariza gazeto: *Antaŭ ĉio, necesas ami sian patrujon kaj pensi pri ĝia feliĉo. Tamen la vera patrioto atentis, ke tiu amo ne estu kontraŭa al bonfarto de la homaro sed fariĝu unu el bazoj por la universala feliĉo. Nur tiam progreso de la patrujo estos akceptita tutmonde. Do la devizo de ĉiu patrioto devus esti tia: "Tra patrujo al homaro"*.

Tiu mallonga citaĵo simple klarigas, ke per amo al sia patrujo oni neniel rajtas ĝustigi militon kontraŭ aliaj nacioj. Natura ordo estas ami siajn gepatrojn kaj familion; poste la homo maturiĝas kaj lia amo pli vastas al patrujo kaj fine al ĉiuj homoj. Bedaŭrinde, hodiaŭ la ignorantoj ŝajnas miksi la nociojn de patriotismo kun naciismo aŭ eĉ kun ŝovinismo kaj nazismo. La plej fanatikaj elpensis eĉ "solvon" por ĉio: forigi naciojn, religiojn, detruu la familion kaj nur tiam oni kreas paradizon en la mondo. Sed tion oni provis fari jam en la pasinteco, ĉu ne? Unu el tiaj estis ankaŭ Neron, la imperiestro.

25-a Internacia Esperanto-Semajno de la kulturo kaj Turismo Tossa de mar. De la 30-a de septembro ĝis la 7a de oktobro 2017

25-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO



Koresponda adreso:

S-ino Rosa Lopez
Granollers, 3,-13°- 3a
ES-08225 Terrasa (Barcelona)
Hispanio
Ret-adreso:
marilo1950@hotmail.es



Tossa de Mar

Bela urbeto, situanta ĉe la t.n. Comarca de la Selva "Ĝangala regiono" provinco de Ĝirono, kun proksimume 5.680 loĝantoj estas nia renkontiĝloko por okazigi la 25-an Internacian Esperanto-Semajnon de la Kulturo kaj Turismo, de la 30a de septembro ĝis la 7a de oktobro 2017. Ĉi bela urbeto, antaŭe estis fiŝkaptista vilaĝo, nuntempe estas turisma urbeto.



ALIĜILO

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Aliĝ-kotizo
Adreso			
Telefono:		Ret-adreso:	
Mi alvenos la..... kaj restados ĝis..... entute tagoj Kosto por kompleta pensio por 1 persono: en dulita ĉambro (40€), en unulita ĉambro (50€), en trilita ĉambro (35€) pagenda surloke (forstreku malĝustajn)			
Aliĝ-kotizo estas antaŭpagenda: ĝis la 31a de majo 25€ ĝis la 31a de julio 35€ ĝis la 30 de septembro 45€ Pagenda al :Bankokonto: OPENI3ANK ES53 0073 0100 5405 0515 4366 Eblas peti peradon de la kasisto de EFE. La restado kaj manĝoj estas pagebla surloke al la organizantoj. Ne pagu per ĉeko, eĉ surloke.			
Bonvolu kunporti vian kvitancon, dankon Mi konscias pri la fakto, ke la aliĝkotizo ne inkluzivas asekuron (portu viajn asekurajn dokumentojn) dum via restado en la 25-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo.			
DATO		SUBSKRIBO	



**Invito al la
94-a Germana Esperanto-
Kongreso
en Freiburg
2-a – 5-a de junio 2017**

Freiburg jam en la jaro de la germana reunuiĝo 1990 gastigis la Germanan Esperanto-Kongreson. Tiam ni eltrovis, ke nia Esperanto-grupo post Nurembergo kaj Munkeno estas **la tria plej aĝa grupo de Germanio** (kaj la plej aĝa en Baden-Virtembergo). Bedaŭrinde nia fondiĝo okazis en maltaŭga jaro, nome 1891, ĉar en tiu jaro jam fondiĝis la Munkena grupo - kvar monatojn antaŭ ni, ho ve! Ĉar tiel ni neniam havos ŝancon inviti al GEK en la jaro de nia jubileo.

Des pli kore ni invitas vin ĉiujn al nia jubile-um-a kongreso. Bonvenon.

Pliaj informoj kaj aliĝilo: <http://esperanto-bw.de/gek-eo>

PRINTEMPoS

de la 14-a ĝis la 22-a de Aprilo 2017
en la kastelo Grésillon (Francio)

- * Esperanto-kursoj por ĉiuj niveloj
- * Aktivadoj kaj ekskursoj
- * Seminario AMO (16-20 de Aprilo)
- * Prelegoj kaj atelieroj
- * Trapasu esperanto-ekzamenojn (ILEI)

Instruos, gvidos kaj prelegos :

					
Zsófia KORÓDY	Christophe CHAZAREIN	Marion QUENUT	Mireille GROSJEAN	Sara SPANÒ	Stefan MacGILL

Alflugu de
Londono
por malpli ol
50€



De la 14a ĝis 22a de aprilo 2017 okazos la 7-a **staĝo PRINTEMPaS**.

- Kurso A1-A2 gvidata de Marion Quenut (Tuluzo)
- Kurso A2-B1 gvidata de Christophe Chazarein (Tuluzo)
- Kurso B1-B2 gvidata de Zsófia Kóródy (Herzberg)
- **AMO-seminario** (C1) "Kiel modernigi la instruadon de Esperanto kun la novaj teknikaĵoj?" gvidata de Stefan MacGill (Budapeŝto) kaj Sara Spano (Italujo)
- Internaciaj Ekzamenoj de ILEI-UEA (21-22.aprilo)
- Prelegoj kun Mireille Grosjean (Svisujo)
- bona etoso kaj bonaj manĝoj (viando aŭ vegetare)

Informoj: gresillon.org/printempas
 Aliĝo: gresillon.org/aliĝo
 aliaj staĝoj: gresillon.org/agendo
 Ĝis baldaŭ en la Esperanto-kastelo
 Greziljono
kastelo@gresillon.org

05-09 avril. Rencontre de la chorale Interkant', au château de Grésillon, 49150 Baugé. gresillon.org/chorale

10-14 avril. Stage pédagogique TAP/NAP, à Kvinpetalo, 86410 Bouresse. kvinpetalo.org

15-18 avril. 69^e Congrès de SAT-Amikaro, à 44230 St-Sébastien/Nantes. sat-amikaro.org

14-22 avril. 7^e PRINTEMPaS, cours intensifs et session d'examens internationaux d'ILEI, au château de Grésillon, 49150 Baugé. gresillon.org/printemps

16-20 avril. Séminaire AMO "Comment moderniser l'enseignement de l'espéranto avec les nouvelles technologies?", à Grésillon, gresillon.org/printemps


Vous pouvez enchaîner plusieurs événements espérantistes.

Grésillon organise, si besoin, du covoiturage
 le 10 avril de Grésillon à Kvinpetalo,
 le 14 avril de Kvinpetalo à Grésillon,,
 le 18 avril de St.Sébastien/Nantes à Grésillon

Grésillon applique une réduction de 20 € lorsque vous participez à un autre événement.

Grésillon a désormais un tarif spécial pour personne à ressources modestes : étudiant, jeune, chômeur

Ni lernu per enigmoj kaj distraĵoj



JG

Ni ridu



Edzo, edzino kaj du filinoj promenas jam de du horoj. Lu individuo sekvas ĉiujn iliajn paŝojn.

La edzino demandas la edzon:

- Ĉu vi kredas, ke tiu sinjoro sekvas nin pro nia Johanino?
- Ho, ne!
- Do tio estus, ĉar al li plaĉas nia Johanino?
- Tute ne.
- Kaj kiun vi kredas, ke li sekvas ?
- Min, kiu ŝuldas al li tricent eŭrojn.

En salono.

Sinjorino parolas pri sia aĝo:

Ĉu ne estas vere - ŝi diras al sia edzo - ke mi havas apenaŭ tridek jarojn ? Vi scias tion.

Jes. Kiel mi ne povas tion scii ? Estas jam tiom da jaroj, ke vi diras tion al mi !

Bela virino alvenas en lago, atente ĉirkaŭrigardas kaj senvestas sin. Subite, aŭdiĝas vira voĉo:

- Banado estas malpermesita en tiu ĉi lago.
- Do, kial vi ne diris pri tio antaŭ ol mi senvestis min?!

• Senvestiĝo ne estas malpermesita!

Edzino al la edzo: „Nun mi iros por kvin minutoj al najbarino, ne forgesu ĉiun duonhoron turni viandon en la bakujo.“

HORIZONTALA :

1. Birdo, rimarkinda per sia bela kanto.
2. Prefikso. Fari. Forta emoci'.
3. Parto de la supra mantelo de la Tero.
4. Planed'. Mondonaco.
5. Malmoligita flugilo de skarabo.
6. INVERSE:ligna plant'. Movi ŝipon.
7. Klerulo en la antikva kelta socio. Buf'.
8. Adverbo. Intermiksiĝo de likvaĵoj.
9. INVERSE:brulema fluaĵ'. Nomo de litero.
10. Danse inverse! Sankta promeso.

VERTIKALE :

1. Surprize.
2. Region' de la ŝultro. INVERSE: tridimensia surfac'.
3. Juĝinstanc'.
4. Adverbo. Nombro. Kemia simbolo.
5. Ago de tiu, kiu ne volas scii.
6. Filino de Tantalo. Kalkeca substanc'.
7. Nomo de litero. Ŝanĝigad' de sia pozicio.
8. Ĉambro de artisto.
9. Antikva plukinstrumento. Petrola frakci'.
10. Mezurunuo de rezistanco. Polininomo kun du terminoj.

- Sinjoro kuracisto, mi ne scias kio okazas al mi, sed mi kontinue furzas. Feliĉe oni ne povas rimarki tion, ĉar ĝi nek odoron nek sonon havas. Eĉ nun, dum ni paroladas, mi jam furzis minime trifoje. Donu al mi iun medikamenton kontraŭ tio!

La kuracisto skribas recepton por la maljunulo, kaj li revenigas lin post tri tagoj.

La maljunulo alvenas post tri tagoj malkontenta.

- Kion vi donis al mi? De kiam mi manĝas tiun medikamenton, ĝi ankaŭ plu ne havas sonon, sed ĝi estas tiom malbonodora, ke oni ne povas elteni ĝin!

- Nu, tiam via flarsenso jam estas en ordo.

Nun mi skribas ion por plibonigi vian aŭdkapablon.

SOLVO de la KVE de La Informilo 176 :

Horizontale: 1.SAŬDARABIO 2.EK. RL. KEMI. 3. MADAGASKAR 4.AROME. GA. 5.TABLOTUK. 6. NK. TRAMO. 7.FINU. KAĜ. 8.INERP. OSRU. 9.NO. GOLGOTO.

Vertikale: 1.SEMAJNFINO. 2.AKAR. KINO. 3.DOT. NE. 4.DRAMATURG. 5.ALGEBR. PO. 6.LAR. 7. AKSIOMO. OG. 8.BEK. TOKSO. 9. IMAGU. ART. 10.OIRAK. ĜUO.

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2017 ĝis 2019

La abon-periodo 2016 jam finiĝis per la lasta numero 176. Ĉi-tiu numero 177 jam estas la unua de la jaro 2017. Ĝi estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj abonintoj. La venontan numeron 178 ricevos nur la abonantoj de la jaro 2017.

La adres-etikedo de via Informilo informas vin pri viaj pagoj. La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abon-jaro, pago (A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE UEA ktp.) kaj eventualo pago por la sekvantaj jaroj 2017 - 2018

Se post via adreso troviĝas la mesaĝo "Fino de abono!!", tio signifas, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon al La Informilo por la jaro 2017. Tiam bonvolu ĝin senprokraste pagi laŭ la ĉi-suba tarifo.

Sam-okaze eblas pagi vian UEA-kotizon laŭ la ĉi-suba tarifo al nia kasisto, kiu senprokraste ĝin perados al UEA.

		Jaroj:	2017	2018	2019
		Abono por la papera versio:	17 eŭroj	17 eŭroj	17 eŭroj
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
UEA	MG MJ(-T)	<ul style="list-style-type: none"> • Individua Membro kun Gvid-libro tra la Esperanto-movado. • Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 34 jarojn, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago). 			11 eŭroj 26 eŭroj
	Pag- manieroj	<ol style="list-style-type: none"> 1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize menci la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: 2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio 3. Por Germanio al nia peranto: Hans-Dieter Platz Poŝtĝirokonto: (menciu la celon de via pago) IBAN: DE13 5451 0067 0091 8566 76 - BIC: PBNKDEFFXXX 4. Per internacia ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu menci la celon de via pago kaj vian adreskodon) 5. Al UEA-konto de TAKE ekat-i (menciu la celon de via pago kaj vian adres-kodon) 			

Libroj eldonitaj de Esperanto France-Est aŭ akireblaj ĉe nia kasisto

"De Karlis al Carlo Rememoroj"

Kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi en malfacila periodo de la dua mondmilito, de Latvio al Italio, filo de Esperanto-paro, latva kaj itala. 12 + 2,80 = 14,80 eŭroj

Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)

Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana fare de E.Ludwig 1,50 + 1,40 = 2,90 eŭroj

Knabaj petolaĵoj Poemoj de Gérard LESER en la alzaca,

tradukitaj al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,40 = 2,90 eŭroj

La harplektaĵo de Sylvie Reff Poemoj en alzaca

kun traduko al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,40 = 2,90 eŭroj

Ĝin rakontoj pri al Katedralo de Strasburgo

Ĝin verkis kaj kompilis Sûzel PAILHES. Ĝi aperis en 12 lingvoj. En la Esperanto-versio ankaŭ aperas la hispana kaj la rusa lingvoj, 48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo 12 + 5,50 = 17,50 eŭroj

Poŝamiko Jen agrabla libreto, kiu trafe prezentas sur 40 paĝoj, gramatikajn resumojn, tekstetojn, kelkajn

ekzercojn kaj laŭtemajn bild-vortarojn riĉe kolor-ilustritajn. 5,10 + 1,40 = 6,50 eŭroj

Rozoj en Esperantujo de Korine

Pasintan junion 2016 dum Esperanto-aranĝo mi vizitis la rozĝardenon en la Haga Westbroekpark. Mi iris "Per IEL al la rozoj", organizita promenado de la Internacia Esperanto-Instituto far Bert de Wit. La parko estas famkonata pro ĝia vasta kolekto de rozoj diversspecaj, bone prizorgataj. Bedaŭrinde nur malgranda parto de la roz-arbustaro jam ekfloris - verŝajne pro la tiu-jara malvarma printempo ja abundis burĝonoj sed la normala florad-periodo estis iom prokrastita. Kutime, la unuopaj rozoj abunde montras la kolor-spektron ekde la tutblanka tra flava al oranĝa al la plej intense purpur-ruĝa, ĉiam kun la floroj en unu sama koloro de burĝono ĝis finflorado.

Tamen, kun miro mi eklernis ke ekzistas nova kultivata specio, kiu ŝanĝas koloron dum florado. Interese! Esperplene, ĉiam novaj disvolviĝoj por iri antaŭen. Dum la ĉiĉeronado Bert de Wit rakontis pri diversaj roz-specoj, inter ili la Zamenhof-rozo kaj la Esperanto-rozo.

Lau invito de la Interkultura Esperanto-Centro en Herzberg am Harz mi ĉeestis ilian 10-jaran Jubilean Festadon kiel La Esperanto-Urbo en julio pasinta. Ie tie mi kunhelpetis en la ordigadoj kaj por la Jubileo kaj por la SAT-kongreso, kiun mi planis partopreni en posta semajno. Sed pri tio mi nun ne verkas.

Inter la diversaj programeroj de la Jubilea Semajnfino estis akceptoj en la bela, vasta Esperanto-ĝardeno de la Esperanto-domo. Tie floris, inter multaj specoj de fruktaroj kaj arbustoj, granda kolekto da ornamaj plantoj altaj kaj ĉe-teraj, la Zamenhof-rozo kaj la Esperanto-rozo. Finfine mi povis alrigardi tiujn speciojn, kaj konstati, ke la Zamenhof-rozo estas speco de t.n. grimpo-rozo.

La 10 jara Jubileo komenciĝis per akcepto en la Welfen-kastelo. Inter la ĉeestantoj estis la urbestro de Herzberg, la urbestro de la Pola ĝemela urbo Gōra, kaj aliaj reprezentantoj de diversaj Herbergaj kaj Esperanto-organizoj el Germanio kaj tutmondo.

Post la oficiala akcepto la grupo de invititoj promenis malsupren de la kastelo al la statuo de Zamenhof ĉe la komenco de la butikstrato de Herzberg. Interbabilante ili daŭrigis tra la piedira strato. Fina celo estis la Urbodomo, kie daŭre flagras kaj flirtas Esperanto flago.



Do: ne nur pro jubileaj kaj festotagoj, sed ĉiam nia konata verda standardo estas hisita, bonkutime, kiel normalaĵo.

En la urbodoma ĝardeneto oni plantis roz-arbuston, donacon de la Interkultura Esperanto-Centro Herzberg. Nek Zamenhof-rozon nek Esperanto-rozon (laŭdire pro nehavebleco ĉe roz-kultivejoj dum tiu sezono) sed tiun novan rozo-specon kun la kolor-ŝanĝantaj floroj, kiun mi ĵus ekkonis en junio. Nun mi malkovris ĝian nomon, kiel trovi ĝin en la roz-katalogoj. Montriĝas taŭga nomo: La Rozo de la Espero!

Julio 2016, Korine Cheizoo

Dr. Zamenhof-rozo, Esperanto-klematito, rozo de la Espero, Esperanto-tulipo, Esperanto-rozo



Bildoj prenitaj el la Jubilea libro 2006-2016
Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo

La 11a MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO 2017



Restadejo Val d'Esquièrre – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

4a - 11a de Marto 2017

Jen la printempa rendevuo de pluraj samideanoj, kiuj deziras kune ĝui la komenciĝantan printempon en agrabla Esperanto-etoso. La hotelo Vacanciel plene taŭgas por tia semajno ĉe la Lazura Marbordo.

Raportas pri ĝi Liba.

La 11-a Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres"

4.3. - 11.3.2017

Post unu jaro ni denove renkontiĝis en suda Francio por kune ĝui agrablan semajnon ĉe la Mediteranea bordo. Partoprenis 101 geesperantistoj el 13 landoj. Alvenis reprezentantoj el Anglio, Belgio, Ĉeĥio, Finnlando, Germanio, Hispanio, Irlando, Italio, Latio, Rusio, Svedio, Svislando kaj la plej multaj el Francio. La plej juna estis unujara knabineto *Rosaria*, filino de la geedza paro *Marek* kaj *Veronika* el Ĉeĥio. La eventon organizis *Christine Graissaguel* kaj *Monique Prezioso* kun helpo de aliaj esperantistoj. La programo ne estis streĉa, sed interesa. Temis ĉefe pri instruado, promenadoj kaj kulturaj vesperoj. Ankaŭ la hotelo proponis programon, kiun ni povis profiti.



Ni loĝis en belega feriejo *Vacanciel* en la hotelo *Val d'Esquièrre*, ĉirkaŭata de ampleksa trihektara parko por agrablaj promenadoj sub majestaj pinarboj. En la pasinteco ĝi estis palaco. La mirinda loko troviĝas inter la urboj *St. Raphaël* (15 km) kaj *St. Tropez* (24 km).

Sabate la 4-an de marto vespere ĉiuj alvenintoj kolektiĝis por preni aperitivan proponitan de la hotelo. La direktoro de la hotelo s-ro *Silvain Ceccoto* kun la urbestro de la komunumo s-ro *Jean-Paul Ollivier* bonvenigis nin. La dua invito al aperitivo okazis vendrede vespere.



Mangĝoj kiel kutime estis abundaj kaj bongustaj. Ne mankis variaj desertoj kaj glaciaĵoj, blanka kaj ruĝa vinoj.

Post la unua komuna vespermanĝo prezentiĝis la kursgvidantoj de la kursoj. Dum la semajno okazis kvar diversnivela E-kursoj. Verajn komencantojn iniciatis al Esperanto *Christine Graissaguel* el Francio. Iom pli progresmajn instruis *Nina Korĵenevskaja* el Rusio. *Marek Blahuš* el Ĉeĥio proponis kurson helpe de sia komputilo por emfazi rapidecon kaj solvi kelkajn malfacilaĵojn. *Dalia Pileckiene* el Litovio paroligis esperantistojn, dividitajn en kvin grupetoj, pri diversaj temoj pli malpli el psikologia vidpunkto.

La kursoj okazis antaŭtagmeze kaj posttagmeze antaŭ la vespermanĝo. Dum la paŭzo je la 10-a horo ni povis trinki teon aŭ kafon kun diversaj biskvitoj kaj ĉokolado. Dum la semajno funkciis ankaŭ libroservo. Ĉifoje oni vendis brokantaĵojn. En la hotelon venis vendistoj, kiuj ofertis diversajn artikolojn por aĉeti. En la ĵurnalo *Var-*



matin aperis artikolo pri nia evento kun komuna foto.

Dimanĉe posttagmeze okazis festo en apuda urbeto *Roquebrune-sur-Argens*. Kelkaj el la partoprenantoj ĉeestis ĝin. Pro iom tro malvarma kaj venta vetero ĝi estis ne tiel impona kaj homamasa kiel pasintjare. Diversaj metiistoj prezentis ok kilogramajn ĉokoladajn tabulojn kun bildoj, kiuj estis poste aŭkciaj. Gesinjoroj *Gabalda* aĉetis unu "tabulon", dispecetigis ĝin kaj dum la kafo-paŭzoj ili regaladis kursanojn dum la tuta semajno.

Merkrede posttagmeze ni ekskursis al la proksima urbeto *Cogolin*, kies simbolo estas la koko. Ni rimarkis ĝin plurfoje dum la promenado kun loka ĉiĉeronino. Ŝi rakontis al ni ĝian historion. La urbo fieras pro sia horloĝ-turo. Ĉiujare en majo en la urbo okazadas la tradicia festo *Bravade de la St-Maur* (Bravaĵoj de la sankta Maŭro -





patrono de Cogolin) por celebri la bataleman historion de la komunumo. La urbo estas ĉefe konata pro fabrikado de pipoj kaj pro manproduktado de tapiŝoj. En la malgranda familia entrepreno, kie estas produktataj pipoj finiĝis la ekskurso tra la urbo *Cogolin*. Revenvoje ni ankaŭ haltis ĉe la haveno *Port-Grimaud*. Ĉiutage post la tagmanĝo estis libera tempo por mallongaj promenadoj kaj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo.

Ĉiuvespere ni ĝuis diversajn kulturajn prezentadojn. La pentroarton de *Salvador Dalí* prezentis *Nina Korĵenevskaja* dimanĉe. *Raita Pyhälä* parolis pri Finnlando. *André Weber* bilde vizitigis al ni la urbon *Schwerin* en Germanio. *Marek Blahuš* skizis la historion de Ĉeĥio kaj parolis pri la universitata urbo Brno, kiu troviĝas en suda Moravio kaj kiu estas la dua plej granda urbo en Ĉeĥio. Proksime de Brno troviĝas la fame konata batalejo *Austerlitz*. Ĉiujare en decembro sur la sama loko okazas spektaklo rememore al venko de Napoleono. *Dalia Pileckiene* prezentis la litovan lingvon, kiu ne similas al Esperanto, kiel iuj opiniis pro tio, ke Zamenhof loĝis ankaŭ en ŝia gepatra lando. Tre impresa kaj bone aranĝita estis la duhora bildprezento pri Vjetnamio de *Jean-François Cousineau*.



La lasta vespero, kiel kutime en ĉiuj E-aranĝoj konsistis el prezentadoj de ĉeestantoj. La kursanoj pretigis diversajn amuzajn skeĉojn, deklamon de poemo kaj estis sprite klarigitaj kelkaj konfuziloj. Ne mankis tombolo en kiu ĉiu gajnis ion. La vespero finiĝis per dankoj al la organizantoj kaj kursgvidantoj. Sekvis dancado akompane de akordiona muziko.

Raportas Liba
fotoj de Andreo



Kolĉiko

Kiel brila himno al la sunsubiro
O fertante al ĉielo lumegan butonon,
La kolĉiko, harpo, sentimentala flor'
Ĉarmega halo en dormeta rozeo,
Izolata, prisemita, aŭ en splenda korbo,
Kvarvers' poemo kiam aperas Aŭtuno,
O do al beleco de dolĉa memoraĵ'.



SOVAĜA IRIDO

Semita en suna, varma ŝtonetaro
O ho! malhela ametist' ensmeraldjuvelujo,
Valora tapiŝo ekmontras surprizojn
Apud la ora flavo en beleco' konkurso
Ĝia helrozokolor' ebrigas abelojn
Al magia rizomo, dum somera dormo:
Irido kreskanta en printempa makiso
Rara kaj sekreta Provenca trezoro
Intime kaŭras, milda kaj timida,
Dehiskas ĝojan tufojn en velur' brilega

RIQUEWIHR



La burgo HAUT-KOENIGSBOURG



FERVOJA MUZEO (Mulhouse)



Ekomuzeo (subĉiela muzeo) de Alzaco en UNGERSHEIM



La fortikigita preĝejo de HUNAWIHR



La vilaĝo RIBEAUVILLÉ



KAYSERSBERG



La ĝardeno de la vivantaj papilioj



Nia Foto-paĝo montras la turismajn lokojn de la venonta IFEF-kongreso en Colmar en majo 2017

STRASBURGO, l'eŭropa urbo!



La parko de la cikonioj kaj de la lutroj en HUNAWIHR

